**EKO**

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

*EKO 2020-45 sendita el Budapeŝto, la la 8an de septembro*

## Enhavo


- AMO 67 – ni rejunigu Eŭropon!
- Amikumu – bezonas apogon
- Tago de Ameriko - sekvoj
- Universitata agado en Rusio
- Samarkando vokas por salutoj
- Poznano laboradas plu



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 67 – provo je programo

Ni jam raportis pri tiu seminario. La proponata programo estis dissendita antaŭ semajno al ĉiu koncernato, sed apenaŭ revenis klaraj respondoj. Do, ĝi restas tre teoria.

Temo: Varbado de junuloj

Dato: septembro 13 (dimanĉo).

Tempo-sistemo: Centr-Eŭropa Somera Tempo (CEST). Tio estas UTC +2.

15:00 - Malfermo: Enkonduko SMG (mi pretigos lumbildojn).

15:15 - Prezento de TEJO: Moderna teknologio en la altiro de junuloj.

15:45 - La rolo de regionaj asocioj ekzemple de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

– Małgosia Komarnicka.

16:15 - Prezento de TEJO: La Eŭropa situacio:

- konsiloj kaj gvido en la varbado de junuloj
- strategio por fortigi kaj restarigi Eŭropajn sekciojn.

16.45 – La ĵurnalista asocio TEĴA– Alfred Schubert.

17.15 – Forumo kaj diskuto. Malferma al ĉiu. Panelistoj bezonataj!

18.00– Provo kompili/akcepti liston de rekomendoj

Ni alkroĉas bonegan studon, kiun faris TEJO pri ĝiaj sekcioj tra la mondo. Do, baza dokumento por nia seminario.

Petintoj ricevos la alirinformojn post 2-3 tagoj. Ni akceptas ankoraŭ petojn – jam venis deko el Germanio, Irlando, Italio, Brazilo, Aŭstrio, Rusio kaj Argentino.

# Amikumu vokas por subteno

La estonteco de Amikumu dependas de vi kaj la komunumo. Se ni ekhavas 500 novajn orajn membrojn ĉi-monate, ni povas daŭre funkciigi Amikumu kaj ni jam estas 10% tien! Ĉu ni povas dependi de vi por helpi al ni atingi nian celon kaj daŭrigi Amikumu longe en la estontecon? Tiel vi ĉiam povos trovi proksimajn esperantistojn ie ajn en la mondo! https://app.amikumu.com/orighu

Por montri, ke ni seriozas pri la komunumo, ni nun reprogramas la tutan apon kaj malfermkodigos ĝin! Ĉi tiel la komunumo povas pli engaĝiĝi kaj kunfari la apon, tiel ĝia potencialo estos senlima. Ni ankaŭ aŭdis la zorgojn de la komunumo pri nia mesaĝilo, do ni decidis tute reprogrami tion de nulo por doni pli agrablan sperton.

**Dankon, ke vi estas parto de nia komunumo** kaj esperable ni povos renkontiĝis iutage por esperantumi kune! :) Por faciligi tion, dum limigita tempo, ni ofertas rabaton de 10%, do oriĝu nun ĉe https://app.amikumu.com/orighu.

Chuck Smith, teknikestro de Amikumu <info@amikumu.com>

# Aliĝu al la informaj leĝioj!

La konstruado de la informa reto pri Esperanto daŭras sub la gvido de la estrarano pri informado de UEA. Bonvolu instigi la homojn, kiuj respondecas pri informado en via loka grupo aŭ landa asocio aliĝi al ĝi per senteksta mesaĝo al:
informa-ret-pri-esperanto+subscribe@groups.io

# La Tago de Ameriko registrita

Spektu realtempe la Tagon de Ameriko kadre de #mondafest2020

https://www.youtube.com/watch?v=IAeaTnP1tFM

Amerikfesteme,

Luis Obando, Rafael Despradel kaj Fernando Maia Jr.

**Universala Esperanto-Asocio / Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**


Jen unuopa kontribuo el Venezuelo, kiu montras refortigon pro la alveno de nova generacio:

https://youtu.be/rq1ND2HC2Z8

## El la riĉaĵoj de la Kongreso de ILEI

Pri la instruado de Esperanto en RUDN (rusa universitato) dum la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI: https://www.youtube.com/watch?v=G6quxtoGCQM

## La Internacia Letertago – ĝis oktobro 18



La 18-a de oktobro estas la Tago de Samarkando. La urbo invitas ekspoziciaĵojn: povas temi pri poemo, kanto, desegnaĵo, foto, aŭ verko, kiu komunikos bondezirojn aŭ sonĝojn por la estonto de la urbo.
Bonvolu sendi viajn reeĥojn, gratulmesaĝojn kaj alispecajn kontribuojn, laŭeble, ĝis la 1-a de oktobro 2020 al imps86@yahoo.com. La plej interesaj kontribuaĵoj estos publikigitaj en nialanda gazetaro kaj en la venonta eldono de "Konciza Enciklopedio de Eksterlanda Samarkandiana: Kulturo Unuiganta la Mondon". ĈIU ricevita mesaĝo estos danke agnoskita kaj la raporto pri la evento estos sendita al ĈIUJ partoprenantoj.

El la 2760-jara Samarkando, la urbo de Monda Heredaĵo de Unesko,

Anatolij Ionesov, Enciklopedia projekto "Samarkandiana", P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando,Uzbekio. Retpoŝto: imps86@yahoo.com

## Lingvemuloj – jem invito!

La Interlingvistikaj Studoj (Etnolingvistika Instituto, Novfilologia Fakultato, Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, Pollando) organizas sian **kvinan internacian interlingvistikan simpozion inter 17-18.09.2020** en Poznano en virtuala formo. La ĉefa temo estas ***Rolo de lingvoj en interkultura komunikado***. Dum la du tagoj okazos 60 fakaj prelegoj, en tri paralelaj blokoj. La tri laborlingvoj de la simpozio estas: Esperanto, angla kaj la pola.

Programo kaj aliĝo: http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/simpozio2020.html

La fakan aranĝon ni konsilas priatenti al lingvistoj, sociologoj, instruistoj kaj proponas informadi pri ĝi en la landaj universitataj kaj sciencaj rondoj. Al la evento eblas senpage aliĝi ĝis la 15a de septembro. La aliĝintoj povos sekvi vive la prelegojn, kaj ankaŭ tio ne estas problemo, se la prelegtempoj estas ekster ilia komforta tempozono, ĉar dum unu monato post la evento ĉiu aliĝinto povos (re)vidi la programojn en la reta platformo de la simpozio.

====== vortoj: 790 ========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.